## Nia solvo de la februara krucvortenigmo

| | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| K | O | N | S | U | L | O | ■ | R | O | K |
| I | N | U | N | D | O | ■ | V | A | R | O |
| O | D | K | ■ | O | ■ | S | E | K | A | L |
| ■ | O | S | T | ■ | F | T | L | ■ | D | O |
| N | ■ | O | R | E | L | O | ■ | L | E | M |
| A | L | ■ | B | L | O | V | I | ■ | A | B |
| R | A | D | ■ | I | K | O | N | O | ■ | O |
| C | K | ■ | A | R | O | ■ | O | N | I | ■ |
| I | M | A | G | I | ■ | S | ■ | K | R | I |
| S | U | N | O | ■ | S | T | E | L | A | R |
| O | S | O | ■ | K | A | R | T | O | N | O |

Refoje dankon al Suzanna Barabás, kiu ja scias kiom estas duono de sako

## Jen niaj respondoj al la "Eta Kvizo" en la januara numero:

LEONTODO estas planto. L.L. ZAMENHOF estis okulisto. SKOMBRO estas fiŝo. VOLFRAMO estas metalo. GEPARDO estas rapidkura katego. ESPERANTO aperis en la mondo en 1887. ALAŬDO estas birdo. LEPORO estas besto simila al kuniklo. PETROSELO estas kuira kaj garna herbo. WILLIAM AULD estas **poeto, eseisto, redaktoro, tradukisto, <u>kaj</u> verkisto de lernolibroj!** MUSONO estas azia vento kun pluvego. MALEOLO estas parto de la kruro. VESPERTO estas flugilhava besteto. KARMEZINO estas koloro. MORBILO estas grava malsano precipe de infanoj. SAFRANO estas multekosta spicaĵo. PAPAGO estas parol-kapabla birdo. ORKADOJ estas nordaj insuloj. KRESPO estas patkuko. RIBO estas frukto.

Kiu jam sciis ĉiun ĝustan respondon sen helpo de vortaro, tiu estas geniulo. Dankon denove al Marjorie Boulton.

**Du hundoj parolas. Diras la unua, "Mi ne komprenas kial mi estas tiel anksia, ĉar mi bone manĝas, dormas kaj ekzercas." "Nu," diras la dua hundo, "se vi estas anksia, via nura solvo estas konsulti psikiatron." "Ho, ne! Tion mi ne povas." "Kaj kial ne?" demandas la dua hundo. "Kiel mi povas? Oni ne permesas min sur la kanapo."**

**— Ed Harler**

★ ☺ ★ ☺ ★ ☺ ★